



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Franclingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

Jarabono : 80 fkoj

P. BABIN

Le Haut des Bourrellières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1994 — 3

(JULIO-AUGŬSTO-SEPTEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... la muzik-komponisto Ĉajkovski...

KOMPARA TABELO DE LA TRANSIRA EVOLUADO DE LA ANTIKVAJ ALFABETOJ

Fenicia	Cipria	Samaria	Aramea	Rabena	Estrangeia	Palmira	Nestora	Sabea	Siria	Zenda	Himjarita	Tamaŝeka	Gudjarati	Paspa
† & 4 † † 9 9 9 9 9 8 4 9 7 7 7 4 4 4 11 11	* O † 8 † †	~ 9 7 9 8 8 2	† 9 ^ 4 7 7 2 2	7 7 7 7 7 7 7	7 7 7 7 7 7 7	7 7 7 7 7 7 7	7 7 7 7 7 7 7	7 7 7 7 7 7 7	7 7 7 7 7 7 7	7 7 7 7 7 7 7	7 7 7 7 7 7 7	7 7 7 7 7 7 7	7 7 7 7 7 7 7	7 7 7 7 7 7 7

... Kaj pri la transkribado de la homa penso

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario : Jeannine VINCENT

26 bis, rue de Milngavie, 49150 BAUGE

Komitatano :

Pierre Babin

ENHAVO

paĝo

El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (A. Frangeul)	2
La vento de provenco (G. BoukoèLevy)	3
Transkribado de la homa penso (Luis Carlos)	4-6
Dionizo (S. Boniol)	7-8
Esperanto en Afriko? (B. Golden)	9-10
Monte-Kristo (A. Dumas- R. Dupuis)	11-13
Por via Distro	14
La Vivo en Gresillon	15-16

El Gresillon

laborojn. La nuntempaj vivkondiĉoj ŝanĝis la dezirojn kaj postulojn de la feriantaj homoj entute, kaj ankaŭ de la esperantistoj. La adaptiĝo al tiu "nova vivo" ne estas facila sed necesa.

NI FUNEBRAS

Finiĝis la 43-a somera programo de la Esperanto-Domo. La jaro 1994 alportis al la respondeculoj du ĝoj-okazojn: novan sukceson de la Internacia Infanrenkonto dum la printempaj ferioj, kaj la kongreson de SAT-Amikaro, kiu ne nur vivigis dum pluraj tagoj bienon ĵus eldormiĝinta post travintrado, sed ankaŭ konatigis al multaj gesamideanoj lokon fonditan ankaŭ por ili sed kies alvojn ili ĝis nun ne konis. Ni esperas, ke ili revenos ankaŭ eksterkongrese, ĉar subteni Gresillon estas subteni esperanton.

La somero ne alportis similajn ĝojojn. La diversaj studperiodoj estis ne plene kontentigaj laŭ la nombro da vizitantoj. Tiu fakto kompreneble ne endanĝerigas la pluvivon de la Esperanto-Domo sed devigas la respondeculojn prokrasti kelkajn modernigajn eĉ gravajn kvankam ne urĝajn prizorgajn

La listo de malaperintaj amikoj de Gresillon plilongiĝas. Pastro GOUDE mortis, post plurjara suferado. Tre aktiva esperantisto, li multfoje vizitis la kastelon, kies etoson li ŝatis, ĉar, dum pluraj jaroj, li oficis en la preĝejo de la urbeto Vieil-Baugé, proksime al Gresillon. Dum la somero li ofte celebris meson en la Internacia Lingvo. Poste li estis sendita al alia urbeto apud la riverego Loire. Kvankam li estis multokupata li kiel eble plej ofte vizitis Gresillon, kie li renkontis geamikojn. Ĉiuj alte taksis lian moralan valoron kaj lian spirit-larĝecon. Al lia memoro ni dediĉas elkorajn pensojn kaj al lia fratino amikajn kondolencojn.

Esperanto tra la Mondo



LA UNIVERSALA KONGRESO-

Ĉirkaŭ 1 800 homoj el 66 landoj diskutis la temon "Azio en la mondo" dum la 79-a universala kongreso de Esperanto, kiu okazis en Seulo, fine de julio. La plimulto de la partoprenantoj venis el Ekstrem-Oriento. La inaŭgura parolado estis farita de D-ro Young-hun Kang, eks-ĉefministro kaj prezidanto de la Korea nacia Ruĝa Kruco.

La Universala Kongreso 1995 okazos en Tampere (Finnlando). En 1996 ĝi okazos en Prago kaj en 1997 en Adelajdo (Aŭstralio).

EŬROPA FESTIVALO- Venis 380 partoprenantoj el 22 landoj en la urbeton Szazhalombatta, apud Budapeŝto, en julio. Krom la arta programo oni aŭdis interesajn prelegojn pri la lingvaj problemoj en Eŭropo de Hans Erasmus, Umberto Brocatelli, Mark Fettes, Michael Cvik, Giogrgio Silfer kaj Sean O'Rain.

LABORGRUPO EN EŬROPA UNIO-

Antaŭ 5 jaroj stariĝis laborgrupo pri la komunikado en Eŭropa Komunumo. Unue la laborgrupo redaktis tekston sub la titolo "Komunikado de la Eŭropa Komunumo". Lastan jaron, la laborgrupo okazigis en la Eŭropa Parlamento, en Bruselo, kune kun la Fondaĵo Hans Seidel, seminarion dediĉitan al la lingva problemo en Eŭropa Unio. Sperto de la seminario estis la konsterna manko de baza scio pri planlingvoj fare de la partoprenantoj. La grupo nun provas kunordigi la aktivecojn de la esperantistoj pri la agado ĉe Eŭropaj instancoj. Adreso: Hans Erasmus, Laan van Oostenburg 40, NL-2271 AP Voorburg, Nederlando.

PROJEKTO ESPNET-

Esperanto-societo en Maribor (Slovenio) invitas ĉiujn esperantistojn, kiuj estas iel ajn ligitaj al komputismo, aliĝi al la ĝis nun plej granda projekto, kiu ligas esperanton kaj elektronikon: aliĝi al komputila reto nomata "Espnet". Tio estas mondvasta projekto, kiu ebligas al ĉiuj esperantistoj, uzantaj komputilojn, interligiĝi, interligi informojn kaj debati

tre rapide, malmultekoste kaj efike. Eĉ se vi jam estas uzanto de iu jam ekzistanta reto (Internet, Fidonet,...) rilatu kun Boris Herman, Kamniska graba 11, SLO-62351 Kamnica, Slovenio.

EL ITALIO- Esperanto oficiale fariĝas studobjekto en la universitato de Torino. La katedro komencos la lekciojn jam ekde la venonta universitata jaro, kun Prof. Fabrizio Pennochietti.

INTERNACIA STUDUMO PRI TURISMO-

Internacia Asocio "Monda Turismo", en Bydgoszcz (Pollando), informas pri Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, kiu de nun, estas trijara kaj eksterĉeesta lernejo. La studumo ebligas akiri jenajn kvalifikaĵojn: 1-a jaro: esperanto-informanto kaj vojaĝgvidanto; 2-a jaro: turisma esperanto-ĉiĉerono, kultura animanto; 3-a jaro: gvidanto de turismo, specialisto pri internacia turismo. Krom esperanto oni lernas diversajn lingvojn kaj kulturojn. Diversaj diplomoj estas akireblaj. Informas: Monda Turismo, str. Skłodowskiej-Curie, PL-85 & 94 Bydgoszcz.

LA FAME-PREMIOJ 1994- La 4-a Esperanto-Kultur-premion de Fame-fondaĵo kaj germana urbo Aalen, de totala valoro de 10 000 germanaj markoj, ricevos en 1994 "Heroldo de Esperanto" kaj la kroata verkistino Spomenka Stimec pro sia verkaro kaj pro multjara aktivado en Internacia Kultura Servo en Zagrebo.

ESTONTAJ RENKONTOJ-

Internacia seminario de Germana esperanta Junularo, en Tübingen, 27-12-94 ĝis 3-1-95. temo: "Rubo, pinto de civilizacio?" Kontakti: Nicola Buscotte, Jägerstr. 6c, D-48153 Münster, Germanio.

Dua internacia kultura kaj turisma semajno en Katalunio, sub aŭspicio de la Hispana Muzeo de Esperanto, 15-22 de oktobro, ĉe la institucio Centro Borja, en la turisma urbeto Saint Cugat del Valles. Inf. Esp. Fervojista As., ap.15027, 08080 Barcelona.

LA VENTO DE PROVENCO

Nia bela Provenco estas submetita al ventoj, eĉ ventegoj. Mi legis, ke 32 diversaj ventoj blovas tra nia regiono. La plej fama el ĉiuj nomiĝas "mistralo". Oni diras, ke ĝi pelas for la nubojn. Al ĝi ni ŝuldas nian belan bluan ĉielon. Pluraj verkistoj spertis ĝin. Jen kiel Alexandre Dumas, Grafino de Sévigné, Emile Zola kaj Alphonse Daudet perceptis ĝiajn kolerojn.

Alexandre DUMAS -

Ĉar nenio malhelpas ĝiajn ekblovojn, tie ĉi ĝi majestece sterniĝas. Tiam, ekde ĝiaj unuaj elspiradoj, gregoj, hundoj kaj ŝafistoj, kiuj konas sian malamikon, rapidas pliproksimiĝi, alpremiĝi unu al la aliaj, kaj kontraŭstarigas densan unuiĝon al ĉiuj ĝiaj atakoj. Tiam la mistralo ĝemas, siblas, roras, eksplodas. Jen ĝi trakuras la ebenaĵon Crau sub formo de kirlovento kaj tiam la ŝtonoj turniĝante suprenleviĝas kiel trombo. Jen ĝi impetas per mallarĝaj ekblovegoj, kaj tiam ĝi pelas la ŝtonojn kvazaŭ foliojn. Jen finfine ĝi tanĝas la grundon, kiel ampleksa bronza erpilo, kaj tiutempe, se ĝi trovas izolitajn ŝafojn, paŝtiston aŭ kabanon, ĝi ilin forportas, rulas, kontuzas, frakasas, neniigas. Ŝajnas ke, dum sia kurado, ĝi formanĝis ilin, ĉar poste, kiam ĝi estas reirinta en siajn montojn, restas eĉ ne spuroj el la aĵoj de ĝia kolerego envolvitaj, kiam ili troviĝis en la faldoj de ĝia terura mantelo.

Alphonse DAUDET-

Lastan nokton mi ne povis dormi. La mistralo koleriĝis, kaj la sonadoj de ĝia voĉego tenis min sen dorma ĝis la mateno. Peze lulante siajn kriplajn alojn, kiuj siblis pro la bizo kiel ŝipa velaro, la tuta muelejo krakis. Tegoloj ekflugis

el la disvenkita tegmento. Fore la premitaj pinoj per kiuj la monteto kovriĝas, skuiĝis kaj bruetadis en la malhelo. Oni kredus sin plenmare naviganta.

Grafino de SEVIGNE-

S-ino de Chaulnes demandas ĉu mi estas feliĉega tie ĉi sub agrablaj sunradioj. Ŝi imagas al si, ke ĉiuj niaj tagoj estas teksitaj el oro kaj silko. Ve, kuzo mia, ni centfoje pli ol en Parizo suferas malvarmon. Ni estas submetitaj al ĉiuj ventoj: jen la suda, jen la bizo, jen la diablo. Kiu el ili nin insultos? Ili interbatalas por havigi al si la honoron enkarcerigi nin en niaj ĉambroj. Ĉiuj niaj riveroj glaciĝis. Rodano, tiu Rodano tiel furioza ne povas kontraŭstari. Niaj skribilujoj frostigitaj, niaj plumoj ne plu gvidataj de niaj glaciigitaj fingroj. Nur neĝerojn ni enspiras; niaj montoj estas ĉarmaj en iliaj hororaj troecoj. Ĉiutage mi dezirus pentriston por bone bildigi la vastecon de ĉiuj tiuj ĉi malbelegaj belaĵoj. Jen kie ni troviĝas!

Emile ZOLA-

Kiam blovis la mistralo... estis furioza kolerego, daŭra trombo, kiu skurĝis la domon, ĝin ŝancelis de la kelo ĝis la subtegmento; noktodaŭre, tagdaŭre, senĉese. La teglaro ekflugis, la fenestroferaĵoj forŝiriĝis; dume, tra la fendoj la vento penetris internen, en ia kolerega plenda zumado, kaj la pordoj, en la plej malgranda forgeso kanonbrue refermiĝis. Ŝajnis vera sieĝo elportita meze de bruego kaj angoro.

Geneviève BOUKO-LEVY

(el dokumento aperinta en la periodaĵo "Vivre en Provence")

Transskribado peralfabeta de la Homa Penso


La transskribo de la homa penso havas sian historion, pro tio ke ĝi disvolviĝis, kaj evolue disvastiĝis sur la tuta terglobo. Jam de longe forpasis la tempo, kiam oni kredis, ke la hebrea alfabeto estis unu el la plej antikvaj uzitaj skribmanieroj kaj ĝin uzis la unuaj homoj; plej erare. La hebrea alfabeto estas nur aliformiĝo de la fenicia skribmaniero, el kiu poste devenis ĉiuj aliaj alfabetoj nuntempe en uzado sur la tuta terglobo; sed la fenicia alfabeto mem estis antaŭita de aliaj skribsistemoj tre rimarkindaj kaj ludis gravan rolon en la historio de la civilizacioj. Tiuj specialaj skribmanieroj, el kiuj kelkaj estis en uzado dum jarcentoj, montras sufiĉege al ni, ke dum ĉiuj epokoj, pratempaj aŭ nuntempaj, la homo ĉiam penadis transskribi kiel eble plej facile kaj simple sian penson per ia ajn skribo, ĉu por rememorigi faktojn memorindajn, ĉu por transdoni pri ili la konon al posteuloj, ĉu ankaŭ, kaj tio estas tre konjekt-ebla, daŭre konservi sian penson, kiel dokumentaĵon.

Kelkaj homogrupoj tre malmulte civilizitaj neniam kaj neniel perfektigis sian skribmanieron, sed aliaj pli inteligentaj kaj progresemaĵ celis kontraŭe perfektigi la skribarton kaj ankaŭ la manieron presi kiom eble per iu perfektigita liter-skriba stampilo siajn tagnotojn, uzante por tiu celo brikojn, ŝtonojn, metalojn aŭ papirusajn foliojn; kaj tiel perfektigante kaj ĉiam pli kaj pli simpligante la skribmanieron ili atingis la eblon posedi literaron plenan, kiu ebligis al ili transskribi ĉiujn nuancojn de la homa penso.

Certe oni tre miras, kiam oni vidas la perfektecon de la skribarto, kiun atingis la Egiptoj de la unuaj dinastioj, tio estas antaŭ 4 000 jaroj de la tempo,

kiam oni starigis la tempokalkulan sistemon.


La skriboj de la Ĥaldeoj kaj de la Ĥinoj estas ne malpli antikvaj, sed ili estis komplikaj pro tio, ke ĉiu gento havis sian aparte propran skribon kaj literaron. Tial, tuj de la komenco, kiam la hieroglifaj sistemoj aperis, la penadoj konstantaj de la tiamaj skribistoj por ilin simpligi ne ĉesis ĝis kiam ili fine sukcesis fari ilin facile uzeblaj kaj por ĉiuj legantoj pli legvide kompreneblaj. Samtempe kune kun la sakra skribo aperis alia populara.



Specimeno de Anatolia skribo.



Specimeno de najloforma skribo.



Specimeno de Hieratika skribo.

Tamen oni malfacile komprenas la interrilatiĝon, kiam oni komparas la simplecon de niaj nuntempaj literalfabetoj kun la antikvaj, kaj, ke ĉiuj el ili havas saman devenon aŭ parencecon; kaj tial oni pli facile kredus, ke niaj nuntempaj literalfabetoj estus elpensitaj de iu geniulo, kiel oni longatempe tion opiniis, kaj transdonitaj poste de la fama Fenicia ŝipesploristo Kadmuso, ol la simpla transaliformiĝo nature evolucia.

Sed estas tute alie, kaj oni povus, ne timante kontraŭdiron, facile elmontri, ke niaj modernaj skribmanieroj devenas de natura

disvolviĝado kaj aplikado de nedisig-eblaj leĝoj de la homa penso, el formoj pli komplikaj, ol la homo estis iam elpensinta ilin! Same kiel la vivantaj lingvoj la skriboj estas vivantaj organismoj submetataj al la evolucia transformado. La ĉefa aganto de tiu transformado, kiel estas opiniata, precipe devenas de mallaboremo altrudita de la mano, kaj la homo ĉiam deziris helpi ĝin kiom eble plej, por levi malpli ofte la kalamon, kaj per unu sola streksigno, esprimi tujan ideon, kiun antaŭe li estis devigata esprimi per multe da necesaj streksignoj. De tio ankaŭ devenas la unutoneco de niaj modernaj alfabetoj kompare kun la antikvaj hieroglifoj, kiuj postulis treegan pripensadon kaj skribartecon. Niaj prapatraj antaŭuloj esprimis per pentraĵoj-skribsignoj unu ideon, kiun ni, nuntempe, ĉiuj esprimas per literoj kunligitaj; ĉiu ideo havis sian propran pentraĵon, kontraŭe al la alfabet-signoj, kiuj havas neniun figurantan signifon tial ke ili posedas valoron nur konvencian kaj algebran; sed tiu propreco mem ebligas al ili alfariĝi al ĉiuj ajn lingvoj, ĉar ili posedas kvazaŭ karakteron universalan kaj ĉiutempe aplikeblan.

La tasko, kiun ni prenis sur nin priskribi la resuman historion pri la transskribado de la homa penso tra la epokoj, devas esti konsiderata, ne kiel plena studo aŭ analizo rilate la lingvojn parolitajn dum la antikveco, sed nur kiel trarigarda esploro pri la antikvaj alfabetoj de tiuj lingvoj iam parolataj, ĉar nia priskribo estas esence profesia kaj teĥnika kaj difinita al niaj samprofesianoj, kaj nia nekompetenteco pri la lingvoj de la prapatraj tempoj malpermesas al ni eniri tiun kampon, speciale rezervitan al filologoj. Kiel profesion kuriozaĵon ni speciale verkis tiun artikolon laŭ la vidpunkto presarta, kaj precipe en la celo montri, ke nuntempe la antikvaj lingvoj estas preŝeblaj dank'al la eltrovitaj manuskriptaĵoj, kiuj ebligis post tre grandaj penadoj restarigi la

iamajn alfabetojn, kaj tiel faciligi la kompostadon kaj presadon de verkoj en orientaj lingvoj, kio helpas la esplorantojn, kiuj sin dediĉas al tiuj specialaj laboraĵoj, kia estas la klarigo pri forpasantaj epokfamaj fariĝoj dum la antikveco.

Ni resumos mallonge la historian priskribon rilate la devenon de tiuj alfabetoj, kaj ni esperas, ke ĉiuj niaj samprofesianoj ŝatos ĝin, ĉar ni celis, entreprenante tiun taskon ilin interesi kaj iom instrui pri ĝis nun nekonataj aliformiĝoj de nia nuntempa alfabeto. Ankaŭ tie ĉi, antaŭ ol daŭrigi nian priskribon, ni devas danki unu el niaj plej bonaj samprofesianoj, s-ron Labouret, kiu fariĝis bona esperantisto kaj metis je nia dispono sian tutan orientlingvan manuskriptaron, kio ebligis al ni atingi bonan rezultaton pri tia speciala temo, kia estas la historio de la alfabetoj, iloj de la homa transskribado dum la antikvaj epokoj.

Japanaj skriboj.

の う ろ う の う ろ う の う ろ う	だ ん — し — かん	リ アメ ツ チ ハ オ ホ ソ ラ ハ オ ホ イ	ク ロ ク キ ナ
--	-----------------------------	--	-----------------------

Hira-Kana.

Kata-Kana.

昇
天
我
等
願
爾
名
見

ŝina skribo.

母は宜く教育された其子を常 非に愛します

Japanaj modernaj presliteroj.

Kio do estas literaskribo? Tio ĉi estas arto fiksi la vortojn per konvenciaj signoj skribitaj ĉu mane, ĉu prese, kaj kiujn oni nomis literoj. La literoj estas la ĉefaj elementoj de la skribo. La literoj povas prezenti ĉu figurojn,

ĉu sonojn. Estas nomataj "ideografiaj skriboj" tiuj, kiuj esprimas rekte la ideojn; "fonetikaj skriboj" tiuj, kiuj montras per literoj sonojn de la vortoj esprimotaj.

Do la skribo dividiĝas en du partojn: skribo ideografia kaj skribo fonetika. En la skribo ideografia jen la signoj estas figurado efektiva de la objektoj mem, jen la signoj estas konvenciaj kaj havas kunligecon kun la ideoj esprimotaj. Pri la skribo fonetika ĝi ankaŭ estas dividebla en du partojn: skribo silaba kaj skribo alfabeto, laŭ tio se la literoj estas esprimontaj kompleksan elparolon aŭ nur simplajn sonojn, silabojn aŭ literojn. Tamen oni devas kontraŭvole konfesi, ke kelkafoje la ĵus cititaj klarigoj teorie estas ĝustaj sed plej ofte la faktoj ne kunakordigas ilin. Ne nur en sama skribaĵo oni transiras de figurado al simbolo, sed ankaŭ tiuj skribaĵoj, kiuj ĉe la komenco estis ideografiaj, celis poste silabismon. Tial kelkajn alfabetojn antikvajn oni ne povis tuj ĉe ilia malkovro elĉifri, kaj nur dank'al la senĉesaj kaj energiaj penadoj de la fama franca sciencisto Champollion oni ŝuldas la malsekretigon de tiuj skribaĵoj, kiel estas la hieroglifoj de la Egiptoj.

Ni sinsekve esploras la diversajn sistemojn de tiuj antikvaj alfabetoj, kaj tiel ni vidos, ke la ideografiaj fine fariĝis silabaj, tio estas fonetikaj, kaj tiel el ili venis la ceteraj.

Tiel esplorante, ni vidos, konsekvence, ke el la fenicia alfabeto, kiu konsistis el 22 literoj devenas ĉiuj aliaj: eŭropa aŭ greka-itala, kaj hebrea el kiu devenis la persa kaj hinda. Pri la eŭropa ni parolos aliloke kaj pri la apero de la kursiva skribo, kiu montras jam novan periodon, kiu rilatas ĝis la modernaj epokoj kaj malmulte diferencas de nia nuna skribmaniero.

Dum epoko tre antikva, kiun oni ne povas kun certeco precizigi, sed verŝajne 1 500 jarojn antaŭ Kristo, la unua alfabeto aperis kaj alskribis ĝian elpenson al

la Fenicianoj; tamen, ni diru preterpasante, ke laŭ freŝdataj sciigoj, antaŭ la apero de la egipta alfabeto jam alia ekzistis; ĝi konsistis el elementa hieroglifo uzita de unu el la ĉefaj hebreaĵ gentoj, kiu loĝis sur la supro de la Asiriaj montetoj (Anatolio), kaj kies nomo estis Ketoj aŭ Ketasoj.

La tipografia kompostado de la ĥetaj aŭ anatolaj presliteroj estas facila. Ilia legado estas silaba kaj dekstre maldekstren kaj sinsekve maldekstre dekstren; ĝis nun 800 literoj signoj pri tiu alfabeto estas konataj.

Kelkaj orientlingvistoj alskribas al Moizo la elpenson de la unua alfabeto, kiun laŭverŝajne estus poste alprenintaj la Fenicianoj, post kiam la Hebreoj estus ĝin uzintaj dum longa periodo.

La hieroglifa alfabeto estis ia sakra skribo; nur la pastroj ĝin uzis kaj konis ĝiajn multnombrajn signifojn. Ili estis legeblaj jen supre malsupren, jen dekstre maldekstren, kaj ankaŭ laŭ la direkto montrata de la figuraĵoj.

La "hieratika skribo", kiu estis uzata por la literaturo, religiaj proklamoj kaj ordinara vivado, fariĝis la unua egipta kursiva skribo, kaj konsistis el signoj konvenciaj kaj hieroglifaj. Tiu ĉi skribo estas legebla dekstre maldekstren. Iom post iom la Egiptoj simpligis sian alfabeton figuran kaj simbolan, kreante literojn fonetikajn kaj ĉiu el ili prezentis apartan sonon. Tiu skribo nomata "skribo demotika" fariĝis tre populara kaj komerca skribmaniero. Malmulte da tempo post ĝis apero la tuteco de la egipta nacio ĝin tute alprenis kiel skribon elliberigitan je ĉiuj sekretaĵoj kaj misteraĵoj; kaj tio estas la unua etapo de la alfabeto.

Ŝajnas do, ke la Fenicianoj ĉerpis el la hieratika skribo la unuajn fundamentajn elementojn de sia alfabeto.

Daŭrigota

DIONIZO

Mi invitas vin image veturi al Helenujo dum la V-a jarcento. Dionizo, la dio "kun mioldolĉa rideto" estas travivonta konsiderindan evoluadon de la origino de sia mito ĝis la famkonataj orgiaj festoj, bakĥanaliaj laŭnome, solenataj en Romo.

Laŭ etimologio Dionizo signifas "filo de Zeŭso", de Zeŭso kaj Semele, kiu dum amorado tiom arde sopiris al kontemplado de sia dia kunulo, ke pro blindigo ŝi mortis kvazaŭ fulmbatita. La amorfrukton jen Zeŭso akceptas en sia femuro (el tie venas la plurlingve uzata esprimo "eliri el la femuro de Jupitero", latina formo de Zeŭso). La nomo de la patrino siaflanke similas tiun de trac-frigia diaĵo Zemelo; ankaŭ tiun de la diino Semyla, litovdevena patrino-diino.

La juna dio erare taksata "dio de la vino kaj teatro" (li fariĝos tia nur multe pli poste en Romo), povas esti difinita, kiel dio freneza kaj freneziga. Sen preciza identeco li estas prezentata laŭ ŝtipo de vitbranĉoj foje kronata, aŭ mantelon surportanta, por ke ne estu konfuzata simpla lignobloko...kaj diaĵo. Foje li aperas maskita. Kio videblas post la levo de la masko? Io senvizaĝa; aŭ taŭra kapo (kreta deveno), aŭ cerva kapo (norda aŭ slava origino, en landoj, kie tiu besto estas virec-emblemo).

Ne nur freneza kaj freneziga, sed revoluciema: diaĵo ne de la civitanoj (des malpli de la aristokrataro), sed de la plebo. Dio timiga, malamiko de starigita ordo, eĉ de familio, kiu ne hezitas virinojn postsekvi aŭ bestojn trapeli... ĝismorte. El tio deduktindas, ke Dionizo estas diaĵo ne de la homprilaborita sed de la primitiva naturo; tion konfirmas tiu reveno al praa sovaĝa ĉasmaniero).

Male de la ceteraj dioj Dionizo estas kultata, nek en urboj, nek eĉ en temploj, sed sur la kamparo. Liaj solenantoj, la bakĥantinoj (tre malmultnombas la bakĥantoj), je difinita tago sin kronas per heder- aŭ kverk-folioj, enmanigas ĉu longan kanon per strobilo finiĝantan, ĉu longan bastonon ĉirkaŭvolvatan de hedero kaj bukedforme kronatan. La tiel ornamita intrupo, kiam noktiĝas, eliras el la urbo kaj tutan nokton vagadas tra la montaro ĝis plena elĉerpiĝo. Ili rajtas manĝi aŭ trinki nenion alian ol puran akvon, mielon el sovaĝaj abeluoj kaj lakton el montarbestaroj. Ili iradas plu kaj plu sub akompano de flutoj, kastanjetoj kaj tamburinoj, kio naskas kreskantan ekscitiĝon ĝis kolektiva histerio.

Por simboli tiun revenon al la naturo la bakĥantinoj estas devigataj kapti junajn montarbestetojn (lupidojn aŭ cervidojn), ilin elartiki kaj ilian vivan krudan karnon dent-ataki kaj manĝi...Tiu kruelaĵo verŝajne prezentas anstataŭigan riton, dum en la praaĵ tempoj temis pri infanofero.

Sur unu el la Cikladaj Insuloj estis kutimo, en la epoko ĉi-supre difinita, bovinon ornamita, piedvestita per kotorno kaj promenigi tra la tuta insulo. Poste oni ĝin kondukis antaŭ altaron, kie sub ĝiaj okuloj oni buĉis ĝian idon.

Alia ekzemplo: en Kreto, oni kutimis kunigi kelkajn taŭrojn. La solenanto signis al tiu, sur kiun la festopartoprenantoj devos impeti kaj de kiu ili ŝirprenos karnopecojn manĝotajn krudaj kaj vivaj.

Dum ili kultadas al Dionizo, la kult-adeptoj atingas la ŝtupon de iaspeca mistikismo, ne pro vin-ebriiĝo sed sub influo de ripetigantaj muzik-ritmoj kaj kolektiva ekscitiĝo. Sed el kio konsistas la celo de tiu stranga kulto? El identiĝo kun la dio, el ia komuniĝo kun ties naturo, sume en celo rekonebla en ĉiuj religioformoj.

Tute alispeca montriĝas la religia

aliro tra la misteroj en Eleùziso kaj Samotraco.

La unuaj estis solenataj je difinitaj datoj kaj ĉiuj rajtis esti inicitaj krom la kondamnitaj kaj tiuj la helenan ne scipovantaj.

Jen la inicotoj iras for de Ateno kaj dum du aŭ tri tagoj procesiadas kun oftaj haltigoj (Eleùziso estas malpli ol 20 kilometrojn distanca). Strangaj kutimoj observblas: interalie ili marŝadas kun porkido subbrake kaj survoje ili sin banas kune kun ĝi...

Alveninte sur la loko de la inicado ili tranoktas en fermita ĉambro kaj fastas. Post la fasto ili ricevas hordean kaĉon (hordeo estas la emblemo de Demetera, kies nomo signifas "patrono de la hordeo"). Pri la enhavo de la inicado detaloj mankas, ĉar la inicotoj sin ligis per ĵuro tion teni ĉe si sekreta. Tamen oni scias, ke post la prezento de la diina mito, speco de ludata dramo, venis la vera inicado laŭ du ŝtupoj.

Jen kelkaj vortoj pri la dramo mem: por danki al la homoj pro la bona akcepto, Demetra, kiu sur la vesto de kompatinda malriĉulino vagadis serĉe al sia filino de Hadeso forrabita, favoris siajn bonfarintojn per hordeograjno. Notindas, ke Demetera estas unu el la diinoj, kiuj formas duopon, ĉu kun pli juna alia diino, ĉu kun juna aliseksulo.

Post la dramaprezentado senvaliĝis antaŭ la partoprenantoj la misteroj de la transo. Post plena mergiĝo en timigan mallumon, ili estis abrupte blindigitaj de mirinda lumo orvestanta la surmurajn statuojn. Kaj oni malkaŝis al la adeptoj la postmortan animvojon kaj alfrontotajn prov-ĉagrenojn. Tiel alfrontinte dum la surtera inicado similajn teruraĵojn, ili kapablos, en la postmorta momento, supervenki sian timegon okaze de la veraj teruraĵoj postvivaj. Tiaj misteroj konsistigas savoreligion.

Koncerne tiujn celebratajn en Samotraco, malfacile alirebla insuleto situanta sur rekto inter la granda insulo Samoso, patrujo de Pitagoro, kaj Ida-monto, malpli da detaloj oni posedas pri la tieaj ritoj. Oni tamen scias, ke la tutan jaron ili estis plenumataj kaj ke iu ajn rajtis peti inicadon.

Ni esperu, ke pliaj kaj pluaj esploroj ĉi-temaj iun tagon pli klare prilumos tiujn fascinajn religiformojn.

S. BONIOL

(laŭ kurso en Sorbono)



Mi' pa gis mian abonon
gustate mpe.
KAJ VI ?

al P. Babin, poŝtkonto Nantes 281361L
aŭ al via peranto:vidu liston sur la
lasta kovrilpaĝo

ĈU ESPERANTO EN AFRIKO ?

1- La serĉo de lingvolerna motiviĝo-

Kiu ne konas la lingvogeografion de Afriko kaj ne profunde ekzamenis la psikopedagogian aspekton de lingvolernado ĉe afrikanoj, apenaŭ kapablas inteligente pritrakti la funkcion de lingvo kiel Esperanto en la kompleksa kultura kaj soci-politika situacio de tiu kontinento. Eble la unua esperantisto, kiu skribis pri tiuj temoj, estas Renato Corsetti.⁽¹⁾ Post resuma priskribo de la lingva situacio en la tuta Afriko, li demandas, ĉu Esperanto povas ludi rolon en Afriko, kaj se jes, kian. Corsetti, kiu en 1974 estis komisiito de UEA por regiona agado, petis afrikanojn "difini la eblan rolon de Esperanto en Afriko, ĉar tio ja estas ilia tasko".

Ĉi-rilate la kerna demando estas: kial afrikano lernu Esperanton? Corsetti mem respondas per jena konfeso de nescio: "Sincere, mi ne konas respondojn al la ĉi-supra demando bazitajn sur io alia ol persona intuicio, kaj mi demandas min ĉu entute ekzistas en la movado homo, kiu sufiĉe pensis pri la demando kaj pri la eblaj respondoj". Tio estas tipa ekzemplo de la nebuleca pensado de Corsetti pri la "Esperanto-politiko" rilate Afrikon. Poste evidentos, ke ja estas homoj, kiuj okupiĝis pri la demando kaj proponis respondon. Ĉiuokaze, Corsetti surpaperigis la sekvajn kialojn, bazitajn sur lia intuicio.

a) Esperanto povas multe helpi por kreskigo de interafrika solidareco kaj per pliiĝo de interafrikaj kulturaj interŝanĝoj. (Tio ne estas konvinka kialo, se afrikanoj rigardas al la situacio en Eŭropo. Ili ĝuste povas demandi, kion faris Esperanto dum centjara enradikiĝo en tiu kontinento por kreskigi intereŭropan kulturajn interŝanĝojn.)

b) Esperanto povas kontribui al pli ekvilibrigaj interŝanĝfluo inter Afriko kaj la cetera mondo. (Skeptika afrikano scias, ke tio okazas nur se la cetera mondo uzas Esperanton samcele.)

c) Estas uzeblaj en Afriko ankaŭ la kutimaj "hobiaj" argumentoj uzataj en aliaj mondpartoj:

i. Ferioj estos pli belaj per Esperanto. ("Kie?" demandas la afrikano. Feriaj aranĝoj por esperantistoj kutime okazas en eŭropaj landoj. Kiom da ordinara afrikanoj havas eblon vojaĝi tien por ferii?)

ii. Oni povas havi amikojn en la tuta mondo per Esperanto. (Ne estas universala la deziro havi amikojn en la tuta mondo. Cetere, ankaŭ la lingvoj de la antaŭaj koloniantaj landoj servas por tiu celo.)

iii. Oni povas kolekti poŝtmarkojn per Esperanto. (Ne ĉiuj interesiĝas pri poŝtmarkoj, kaj Esperanto ne estas la ekskluziva poŝtmark-kolekta lingvo.)

iv. Oni povas korespondi ĉiulanden pri ĉiu temo per anonco en Esperanto-gazeto. (Inter la kvar "hobiaj" argumentoj, tiu ĉi estas la sola realeca kaj praktike realigebla agado. Tamen la celo de la korespondado ne ĉiam estas honesta. Ofte afrikanoj uzas internacian korespondadon, ne por starigi amikecon, sed por akiri materiajn avantaĝojn. Cetere Corsetti preteratentis tre gravan "hobian" argumenton, nome "edzperanton")²⁾

Naŭ jarojn post la cerbumado de Corsetti pri lingvolerna motiviĝo en Afriko, Gilles Wallez,⁽³⁾ en artikolo pri instruado de Esperanto en Eŭrobordo esprimas la opinion, ke afrikanoj ricevos multajn avantaĝojn el la lernado de Esperanto, sed li mencias nur jenajn tri:

i. Afrikanoj povas uzi lingvon vere internacian por internaciaj rilatoj, kaj ne lingvon, kiu devige rekondukas Afrikon al ĝiaj ekskoloniantoj. (Ankoraŭfoje la respondo estas, ke tiu uzado eblas nur se Esperanto disvastiĝas kaj aliaj landoj uzas ĝin.)

ii. Esperanto ŝirmas la afrikan kulturan identecon dank'al sia neŭtraleco. (Tio estas tre obskura koncepto, kaj Wallez prezentas neniun praktikan ekzemplon de tiu ŝirmado.)

iii. Esperanto estas pli facile lernebla kaj malpli koste instruebla ol aliaj lingvoj. (Tio estas ridinda kialo por instigi iun lerni fremdan lingvon. Lingvo estas lerninda nur, se ĝi alportas utilon, ne ĉar ĝi ŝparigas monon, tempon kaj penon dum la lernado.)

2- Kial afrikanoj ne bezonas Esperanton

nun- En artikolo titolita "Ĉu Afriko bezonas Esperanton nun?"⁽⁴⁾ Bernard Golden marteladas la punkton, ke Esperanto nuntempe en Afriko estas lukso, do la respondo al la demando en la titolo estas: Ne! Afriko ne bezonas Esperanton nun, ĉar

"...la afrikanoj hodiaŭ devas alfronti problemojn multe pli gravajn ol la internacilingvan problemon. Eĉ la demando pri nacia lingvo ne havas la plej altan prioritaton. Antaŭ ĉio la afrikaj landoj devas plej rapide atingi politikan stabilecon, ekonomian memstarecon kaj socian bonfarton. Kaj tio okazos nek morgaŭ, nek postmorgaŭ. Povas esti, ke estos bezonataj pluraj jardekoj, eĉ jarcento".

Dek kvin jarojn post la publikigo de tiuj linioj, la situacio en Afriko apenaŭ ŝanĝiĝis. Puĉoj kaj pestoj, militoj kaj malsatego konstante perturbas la ĉiutagan vivon kaj neniigas kulturajn valorojn de unu ekstremaĵo al alia de tiu vasta kontinento. Ĉu, do, havas sencon altrudi Esperanton sub tiuj kondiĉoj?

Ankoraŭ unu voĉo eĥas la saman starpunkton. "Ili ne bezonas la kvinan lingvon" estas la titolo de artikolo verkita de Ian Tarrant,⁽⁵⁾ kiu pasigis du jarojn en Kenjo kiel volontula instruisto. Li substrekas, ke Esperanto estas malbonvena en Afriko kaj refutas la rezonadon de Corsetti kaj Wallez.

"...kial la kenjanoj lernu Esperanton? Ili ne havas monon por vojaĝi al (por ili) ekzotikaj landoj de Eŭropo, ekzemple. Ili ne atendas vizitantojn el tiuj landoj; ili ne havas grandan deziron korespondi kun fremduloj, krom

se tio alportos fincan avantaĝon; jam vasta gamo da literaturaĵoj alireblas per la angla...do kial? Multe pli avantaĝe estas plibonigi la jaman konon de la angla ol eklerni novan, apenaŭ utilan lingvon".

La sola reago al la artikolo de Tarrant estis kontribuaĵo al la diskuto fare de Bernard Golden, titolita "Afriko - ankoraŭ tro verda por la 'verda venko'"⁽⁶⁾ Samopiniante kun Tarrant, li skribis, ke se la sekva anonco aperus en afrikaj gazetoj, ĝi certe altirus atenton pri Esperanto.

"Firmao X serĉas homojn por oficoj donantaj bonan salajron. Dungotoj ricevos stipendion por plua trejnado en Eŭropo kaj Ameriko. Anoncu vin, nur se vi havas bonan scion de Esperanto."

Jen absolute nerezisteble lingvolerna motivo por ĉiu afrikano deziranta plibonigi sian ekonomian situacion kaj socian rangon. Apenaŭ estas imageble, kiom da afrikanoj tuj komencus lerni Esperanton.

(daŭrigota)

Bernard GOLDEN

Notoj- 1-Renato Corsetti. La neplugita kampo. Esperanto, decembro 1974.

2-Bernard Golden. "Edzperanto" la mankanta hobi-argumento por esperantigi afrikanojn. Sennaciulo marto 88

3- Gilles Wallez. Kio okazas en Ebura Bordo? Esperanto, junio 1983.

4- Bernard Golden. "Ĉu Afriko bezonas Esperanton nun?"-Esperanto, majo 1978.

5-Ian Tarrant. Ili ne bezonas la kvinan lingvon. Esperanto, marto 82

6-Bernard Golden. Afriko - ankoraŭ tro verda por la "verda venko". Esperanto, aprilo 1982.

MONTE KRISTO

Alexandre DUMAS

(Sekvo)

(Edmond Dantès, maljuste enkarcerigita jam de 14 jaroj, estas najbaro de abato Faria, kiu sukcesis elfosi tunelon inter la du ĉeloj. La du malliberuloj regule vizitas unu la alian. Sed abato Faria mortas.)

....Cetere estis tempo; la gardisto baldaŭ venos. Ĉi foje li unue iris al Dantes; elirinte el ties ĉelo li irus al tiu de Faria kun matenmanĝo kaj tolaĵoj. Cetere nenio indikis ĉe tiu viro, ke li scias pri la okazintaĵo. Tiam Dantes fariĝis neimageble malpacia pro sciado pri kio okazos en la ĉelo de lia mortinta amiko. Li do reiris en la subteran galerion kaj alvenis ĝustatempe por aŭdi la ekkriojn de la ŝlosilportanto, kiu vokis por peti helpon.

Baldaŭ eniris la aliaj ŝlosilportantoj, kaj oni aŭdis la surdan kaj regulan paŝadon kutiman ĉe la soldatoj eĉ kiam ili ne deĵoras. Post la soldatoj alvenis la guberniestro.

Edmond aŭdis la bruon de la lito kiam oni movis la kadavron; li aŭdis la voĉon de la guberniestro, kiu ordonis, ke oni ĵetu akvon al la vizaĝo; kaj vidante, ke malgraŭ tiu faro la malliberulo ne rekonsciiĝis, la guberniestro petis, ke oni venigu la kuraciston. Li eliris kaj kelkaj kompatemaj vortoj aŭdiĝis miksitaj kun mokaj ridoj. "Nu, diris iu, la frenezulo reiris al siaj trezoroj; bonan vojaĝon!". "Sed liaj milionoj ne ebligas la pagon de lia mortotuko," diris alia. "Ho, aldonis tria voĉo, la mortotukoj de kastelo If ne estas multekostaj." - "Eble, diris unu el la antaŭaj parolintoj, ĉar li estis ekleziulo, oni elspozos iom favore al li". "Tiam li havos la honoron de la sako".

Edmond aŭskultis, perdis neniun parolon sed entute ne komprenis

multon. Baldaŭ la voĉoj estingiĝis kaj ŝajnis al li, ke la gardistoj foriras. Tamen li ne kuraĝis eniri; eble iu ŝlosilportanto ĉeestas por gardi la mortinton. Li do restis muta, senmova, retenanta sian spiradon.

Post unu horo, proksimume, anstataŭis la silenton eta bruo, kreskanta. Estis la guberniestro, kiu revenis sekvata de la kuracisto kaj de pluraj oficiroj. Estiĝis silenta momento; evidentiĝis, ke la kuracisto proksimiĝis al la lito kaj ekzamenas la kadavron. Baldaŭ komenciĝis la demandoj. La kuracisto klarigis la malsanon, kiu detruis la malliberulon kaj deklaris, ke li estas morta. "Mi malĝojas pri tio, kion vi anoncas al mi, diris la guberniestro; li estis milda, sendanĝera, amuza pro sia frenezeco, kaj precipe facile kontrolebla." - "Oh, diris la ŝlosilportanto, ne necesas kontroli lin; mi garantias, ke li povus pasigi kvindek jarojn ĉi tie ne provante forkuri, eĉ unu fojon". "Tamen, rediris la guberniestro, mi kredas, ke urĝas, ne pro tio, ke mi dubas pri via kompetenteco, sed pro tio, ke mi respondecas, urĝas, ke vi certigu al ni la morton de la malliberulo." Dum momento regis silento absoluta dum kiu Dantes, ŝtel-aŭskulte, opiniis, ke la kuracisto, duan fojon, ekzamenas kaj palpas la kadavron. "Vi povas esti trankvila, tiam diris la kuracisto; li estas morta, mi garantias tion al vi"....

"Ŝajnas, ke lia nomo estis Faria," diris unu el la oficiroj. "Jes, sinjoro, kaj li asertis, ke tiu nomo estas tre malnova; cetere li estis scienculo kaj sufiĉe saĝa rilate ĉion, kio ne koncernis lian trezoron; sed pri tiu punkto, ni konfesu, ke li estis necedigebla." - "Tiu malsano estas nomata monomanio", diris la kuracisto.

Pliaj ir-kaj revenpaŝoj aŭdiĝis; momenton poste venis al la oreloj de Dantes bruo de ĉifata tolo; la risortoj de la lito grincis; la peza paŝo de homo, kiu levas ŝarĝon bruas sur la platŝtonoj kaj la lito denove grincis sub

la pezaĵo, kiun oni remetis sur ĝin. La ensakigo de la korpo disvolvigis. Kiam ĝi estis finita la guberniestro diris: "Ĝis vespere". "Je kioma horo?" demandis la helpgardisto. "Inter la deka kaj la dek-unua". "Ĉu ni restu kun la mortinto?" "Kial? Vi nur fermu la pordon, kiel kutime." Tiam paŝo-bruoj kaj voĉoj aŭdiĝis, mallaŭtiĝantaj. La seruro kaj la rigliloj grincis, kaj silento pli morna ol soleco invadis la glaciigintan animon de la junulo. Tiam li malrapide levis la ŝtonoplaton per sia kapo kaj esplor-rigardis la ĉambron.

Sur la lito, en pala nebula taglumo, kiu trairis la fenestron, sako el kruda ŝtofo kuŝis, kies faldoj skizis korpon rigidan; tio estis la lasta mortotuko de Faria. Ĉio, do, finiĝis. Faria, la bona utila kamarado, al kiu Edmond tiel forte ligiĝis, plu ekzistis nur en lia memoro. Sola! denove li estis sola! Ĉu ne estus pli bone foriri same kiel Faria, demandi al Dio pri la enigmo de la vivo? La ideo pri memmortigo, forpelita de lia amiko, fortenuita de lia ĉeesto, revenis, kiel fantomo." Se mi nur povus morti, diris li, mi irus tien, kien li iras kaj lin certe retrovus. Sed kiamaniere morti?...Nu ja estus facile, li aldonis kun ekrido. Mi nur restu ĉi tie kaj saltu al la unua eniranto. Mi lin strangolos kaj mi estos senkapigita."...Dantes fortiriĝis de tiu ideo pri hontiga morto. "Ĉu morti? Ho ne! Ne por tia fino mi tiel vivis kaj suferis. Ne, mi volas vivi kaj batali ĝis la fino! Mi forgesis, ke mi devas puni miajn turmentintojn. Sed nun oni forgesos min ĉi tie, kaj mi eliras el mia karcero nur same kiel Faria." Sed ĉe tiuj vortoj, Edmond senmoviĝis, kun fiksa rigardo, kvazaŭ trafis lin subita ideo, timiga ideo. Li levis sian manon al sia frunto kvazaŭ li havus kapturniĝon, du-aŭ trifoje rondiris tra la ĉambro kaj fine revenis al la lito..." Ĉar nur la mortintoj eliras el ĉi tie, mi prenu la lokon de mortinto," li diris al si. Kvazaŭ plua pripensado riskus nuligi lian decidon, li tuj sin klinis al la mizera sako, ĝin malfermis per

la tranĉilo farita de Faria, elprenis la kadavron, kiun li forportis al sia ĉelo kaj metis sur sian liton, ĉirkaŭvolvis lian kapon per tiu tolpeco, kiun li mem kutime surmetis, kovris la korpon per sia kovrilo, kisis lastfoje la glacian frunton, klopodis fermi tiujn okulojn, kiuj ribele restis malfermaj, turnis la vizaĝon al la muro, revenis en la galerion al la alia ĉambro, prenis el la ŝranko kudrilon kaj fadenon, ĵetis siajn vestaĉojn por ke bone sentiĝu, tra la tolo, nudan korpon, enŝoviĝis en la malferman sakon kaj fine kudre-fermis la sakon de interne. Lu ĝuste eniranta povus aŭdi la batojn de lia koro.

La unua danĝero kiu minacis Dantes estis la eventuala konstato, fare de la gardisto, kiam li alportos la supon, ke okazis interŝanĝo. Feliĉe ĉu pro mizantropeco, ĉu pro laceco, plurfoje Dantes akceptis kuŝante la gardiston; tiuokaze la gardisto kutimis meti la manĝon sur la tablon kaj retiriĝis tute ne parolinte.

Kiam, vespere, alproksimiĝis la sepa horo, Dantes vere fariĝis angorplena. Permane premante sian koron, li klopodis malfortigi ĝiajn batojn, dum li, per la alia mano, forviŝis de sia frunto fluantan ŝviton. De tempo al tempo frostotremoj trakuris lian tutan korpon kaj preme tenis lian koron kvazaŭ en glacia ŝraŭbtenilo. Tiam li kredis sin mortanta. Horoj pasis, senmovaj. Fine, je la tempo fiksita de la guberniestro paŝoj aŭdiĝis sur la ŝtuparo. Edmond komprenis, ke alvenis la momento.

Paŝado duobla haltis ĉe la pordo. Dantes komprenis, ke la du entombigistoj venas por forpreni lin. Tiu konjekto certiĝis, kiam li aŭdis la bruon de surteren metata korpo-portilo. La pordo estis malfermata; vualita lumo trairis la saktolon. Dantes vidis du alproksimiĝantajn ombrojn. Tria, ĉe la pordo, tenis lanternon. Ĉiu el la du enirintaj viroj prenis unu ekstremaĵon de la sako... La supozita mortinto estis metita sur la portilon. Dantes restis rigida por pli bone ludi

sian rolon. La grupeto, antaŭirata de la lanterno-portanto, supreniris la ŝtuparon. Subite la freŝa, penetrema aero de la nokto invade alvenis. Dantes rekonis la mistralon, impresomiksita de ĝuo kaj angoro. Post dudeko da paŝoj la portantoj haltis kaj demetis surteren la portilon. Unu el la viroj malproksimiĝis kaj Dantes aŭdis la bruon de liaj ŝuoj sur ŝtonplatoj. Li sin demandis, kie li estas. "Li ja ne estas malpeza!" diris la viro, kiu restis apud Dantes, eksidante sur la randon de la portilo. "Lumigu, do, animalo" diris tiu, kiu alproksimiĝis, "aŭ mi ne trovos kion mi serĉas". - "Kion li serĉas", demandis al si Edmond. "Versajne fosilon." Ekkrio de kontentiĝo montris, ke la viro trovis la bezonaĵon. "Fine!" diris la alia. "Jes; sed li ne malprofitos pro tiu atendado", estis la respondo. Tiam li alproksimiĝis al Dantes, kiu aŭdis, ke oni metas ion pezan apud lin; samtempe ŝnuro ĉirkaŭpremis liajn piedojn, dolorige. "Ĉu la nodo estas farita?" demandis la entombigisto, kiu nur rigardis. "Eĉ bone farita", respondis la alia, "tion mi povas garantii". Kaj, suprenlevita, la portilo daŭrigis sian iradon; je proksimume kvindek paŝoj oni haltis por malfermi pordon kaj plu iris. La bruo de ondoj frakasigantaj kontraŭ la rokoj, sur kiuj estas konstruita la fortikaĵo, trafis pli klare la orelojn de Dantes.

"Malbona vetero!" diris unu el la portantoj. "Ne estos agrable surmare vojaĝi ĉi nokte." - "Jes, la abato nepre riskas malsekiĝon", aldonis la alia kaj ridoj eksplodis. Dantes ne komprenis la ŝercon sed ĝi tamen hirtigis liajn harojn. "Bone, jen ni alvenis," diris unu el la viroj. "Daŭrigu!" respondis la alia, "vi ja memoras, ke la antaŭa restis survoje, rompita sur la rokoj, tiel ke la guberniestro, la postan tagon, nomis nin sentaŭguloj." Oni pluiris kelkajn paŝojn, daŭre supren. Dantes sentis, ke unu prenas lin per la kapo, kaj la alia per la piedoj... kaj ili lin balancas. "Unu, du, tri!". Dantes sentis

sin ĵetita en senliman vakuon, traflugante la spacon, kiel vundita birdo kaj falante kun glaciiga teruro. Kvankam io peza lin tiris malsupren kaj rapidigis lian falon, tiu falo ŝajnis al li senfina. Fine, en bruego, li enpikis kiel sago en la glacian akvon, kio elŝiris krion el lia gorĝo tuj sufokatan de la subakviĝo. Ĵetite en la maron Dantes estis tirata funden de kuglego ligita al liaj piedoj. La maro estis la mortintejo de lf-fortikaĵo.

Dantes, preskaŭ sufokiĝanta kaj senkonscia, tamen retenis sian spiradon. Preta, kiel kutime, je ia ajn eventualaĵo, li rapide distranĉis la sakon per sia malferma tranĉilo, elpuŝis sian kapon kaj sian brakon; sed, malgraŭ liajn klopodojn, la kuglo daŭre tiris lin malsupren. Li arkiĝis serĉante la ŝnuron ĉirkaŭ siaj maleoloj kaj, per lasta superhoma streĉo tranĉis ĝin ĵus antaŭ tuta sufokiĝo. Vigla piedbato revenigis lin supren dum la kuglo fortiris al nekonata marfundo la krudan tolaĵon. Dantes nur enspiris iom da aero kaj resubakviĝis por resti nevidebla. Kiām, la duan fojon, li reaperis, almenaŭ dudek metroj distancigis lin de la faloloko; super sia kapo li vidis nigran ŝtorman ĉielon, kie rapida vento forpelis kelkajn nubojn kaj kelkfoje malkovris lazurspaceton ornamitan per brila stelo. Antaŭ li etendiĝis la muĝanta, malhela maro, kies ondoj komencis boli kvazaŭ fulmotondro alproksimiĝus. Dume, pli nigra ol la maro, pli nigra ol la ĉielo, staris, kiel minaca fantomo, la granitgiganto lf, kies malhela pinto similis brakon etenditan por rekapti sian rabaĵon. Sur la plej alta roko vidiĝis lanterno lumiganta malhelajn figurojn. Ŝajnis al Dantes, ke tiuj figuroj sin klinis al la maro. Denove li subakviĝis por subsurface naĝi bonan distancon; Kutima naĝmaniero por viro, kiu iam estis la plej lerta naĝanto en Marsejlo. Kiam li revenis al la surfaco la lanterno estis malaperinta.

el la traduko de R. DUPUIS

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA PROBLEMO :

Krucvortoj :

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1	S	E	N	K	R	E	D	I	T	I	G	I
2	E	G	A	L	A	N	I	M	A		U	D
3	N	O	V	A	J		A	E	R	U	M	I
4	S	P	O	N	T	A	N		T	R	O	O
5	O	O				I	K	T	E	R	O	
6	I	D	E	O	G	R	A	M	A		B	
7	F	I	K	C	I	A		A	C	E	R	B
8	I	O		E	L		O	N	I	D	I	R
9	G		A	L	O		N	U	D		L	O
10	A	R	K	O		I	T	E		P	I	K
11	Ŝ	A	R	T	E	L		L	U	I	G	A
12	O	L	E	O	D	O	N	A		H	I	T

LITERA ENIGMO

(La solvo konsistas el 77 literoj, kiuj estas numeritaj. Oni povas trovi la literojn pere de la sekvantaj ŝlosilvortoj.)

3 - 5 - 23 - 11 - 7 - 19 - 60 - 6 - 33.: parto de la ŝuo.

39 - 21 - 62 - 42 - 73 - 74 - 49 - 12 - 34 - 65 : rivera bestego.

32 - 9 - 31 - 27 - 35 - 10 - 4 - 17 - 40 : gesta teatraĵo.

22 - 16 - 29 - 18 - 41 - 24 - 36 - 8 - 56 - 35 : lacertsimila besto.

64 - 26 - 27 - 28 - 25 - 30 - 37 - 67 - 42 : podio por ĉerko.

43 - 69 - 51 - 52 - 53 - 48 - 47 - 49 - 50 - 3 : monerscienco.

46 - 45 - 1 - 57 - 54 - 44 - 56 - 2 - 61 - 27 - 38 : seninteresa.

59 - 66 - 20 - 63 - 70 - 72 - 14 - 56 - 74 - 13 : diplomitaj teknikistoj.

77 - 55 - 71 - 68 - 15 - 33 : buŝa fluidaĵo.

75 - 2 - 56 - 6 - 76 - 58 - 14 - 29 - 40 -: supa pastaĵo.

1 - 77 : amara aserto de la angla matematikisto kaj filozofo Bertrand
RUSSELL

LA VIVO EN GRESILLON

De pluraj jaroj la bilanco de la Esperanto-Domo montris ioman malaltiĝon de la nombro da ĉeestantoj kaj, laŭ financa vidpunkto, de la tranoktadoj. Poste venis kvazaŭa stagnado. Nenio grava nun se, kiel anonciĝas, la malprogreso ĉesas. De la fondo de la Esperanto-Domo Gresillon la respondeculoj kutimis konstati ĉiujare pli malpli ampleksan, pli malpli regulan progresadon. Surprizis ilin la ŝanĝo de direkto de la bilanc-linio. Ĉar neniu danĝero minacas la ekziston de la Esperanto-Domo, nur la programon de modernigo kaj gravajn prizorgajn laborojn. Dum la kelkaj kunvenoj la komitatanoj ne havas tempon sufiĉe longe diskuti pri la ĝenerala vivo, sed nur pri la starigo de la sekvontjara kultura programo. La Ĝenerala Jara Kunveno estas okazo por la membroj montri, ke ili fidus la gvid-grupon. Sed neniu sendas kritikojn aŭ proponojn. La afero sufiĉe kontentige kat-zumas.

Sed ĉiujare prezentiĝis en julio neatendita situacio: nur du aliĝoj venis por la lasta dusemajna stud-periodo dediĉita al la instruantoj de Esperanto. Demando ekestis: ĉu nuligi aŭ ne? Ĉu venigi specialistojn pri instruado por du personoj. Ĉu montri al la instruantoj aliĝintaj, nur teorie, sen lernantoj, kiamaniere oni povas instrui? Laŭ financa vidpunkto, ĉu pagi la salajrojn de kuiristo, de helpantinoj, la elektrajn, gasajn elspezojn por ok personoj el kiuj nur du estos pagantoj? La decido estis: nuligo. (Kelkajn semajnojn poste "oni" diris, ke kelkaj "aliaj" "intencis" ĉeesti; bedaŭrinde en tiaj cirkonstancoj, nuraj "intencoj" ne valoras.) Grava sed necesa decido, kiu devigas ĉiujn fari al si demandojn. El la respondoj espereble venos solvoj kaj decidoj. Tiu artikolo intencas fari nur demandojn; la legantoj de Kulturaj Kajeroj, kiuj montras sian intereson ne nur pri la enhavo de la revuo, sed ankaŭ pri la Esperanto-Domo mem, aldonos siajn demandojn kaj proponos respondojn. Tion farante ili multe helpas la gvidan komitaton, kiu havos la gravan taskon trovi solvojn. Jen kelkaj demandoj:

Ĉu la gvidantoj, dum dekoj da jaroj, iom rutiniĝis? Ĉu la programoj proponas sufiĉe allogajn aktivaĵojn kulturajn, sportajn, distrajn? Ĉu la gvidantoj ne kontentiĝis nur pri la sukcesoj kaj ne sufiĉe diskonatigis ilin ekster la 18-hektaroj de Gresillon, en mondo, kiu pli kaj pli baziĝas sur reklamado diversspeca? Dum jaroj vizitis la kastelon amikoj, kiuj konis, eĉ travivis la fondiĝon, la unuajn vivo-jarojn de la Esperanto-Domo. Multaj malaperis. Ĉu la nunaj vizitantoj ne estas, almenaŭ ĝis post kelktaga restado,, nur klientoj? Ili ne estis informitaj pri la aventuro "Naskiĝo de la Esperanto-Domo". Ili scias nenion pri la grandega, multjara, dediĉa laboro de la unuaj respondeculoj. Ili venas al hotelo kaj, eventuale, nur post pluraj tagoj da restado komprenas, ke ankoraŭ nun, homoj senprofite laboras por ilia kelktaga komforto, plezuro, kulturriĉigo. Sed ĉu kelkajn tagojn sufiĉas por krei tiun etoson specialan, kiun multaj nomas la "Grezijona etoso", kiu instigas al reveno? Ĉu la statuto de "kliento" ne igas la novan vizitanton pli postulema pri komuna materia vivo konsiderata tre kontentiga antaŭ 20 jaroj? Ĉu la financaj malfacilaĵoj de la nuntempaj individuoj kaj familioj pravigas la fakton, ke la aliĝantoj ofte trapasas ne pli ol unu semajnon da esperanta vivo, ne ĉiam konsiderante la datojn de komenciĝo kaj de finiĝo de iu staĝo, obeante nur planon de vizitoj al aliaj lokoj?

Eblas fari pliajn demandojn. Karaj legantoj, faru ilin. Respondu sincere, almenaŭ tiujn du lastajn demandojn: "Kial vi ankoraŭ ne vizitis Gresillon? Ĉu oni diris kritikojn al vi anstataŭ al ni? Kion vi ŝatus trovi tie?" "Kial vi jam vizitis Gresillon? Ĉu vi trovis tie, kion vi deziris? Kiujn ŝanĝojn, plibonigojn vi ŝatus trovi venontfoje?" - Estu certaj, ke viaj respondoj estos atente studataj. dankon.

P.B.

LIBRO - SERVO

NOVAJ TITOLOJ SURBRETIGIS

Gramatika gvidlibro (2-a eldono) en bela nova vesto	35 ff
Kiel instrui Esperanton al infanoj hodiaŭ	17 ff
Praktika kurso (5 kasedoj)	300 ff
Lexique de musique	42 ff
Aŭstralia antologio, bele bindita	190 ff
La fremdulo (A. Camus), trad. de M Duc-Goninaz	63 ff
Montara vilaĝo	52 ff
7 000 tagoj en Siberio	150 ff
Glozel kaj la prahistoria skribo (A. Cherpillod)	90 ff
Guide Ilitis - Bio-vinoj en Francujo	70 ff
Esperanto - vidbendo	230 ff

Petu la detalan katalogon de S-ino J. Vincent, 26bis rue de Milngavie
F- 49150 BAUGE

Niaj perkorespondaj kursoj

Por komencantoj: Kurso per mem-korekta metodo. Tiu metodo ebligas progresadon adaptitan al la ritmo elektita de la lernanto, kiu, paŝon post paŝo, korektas mem siajn erarojn. Testo-folioj sendotaj al la korektanto ebligas kontrolon. La korektanto tiam atentigas la lernanton pri la lingvaj punktoj ankoraŭ ne bone asimilitaj

La prezo de tiu kurso estas: 200 f.f.

Por praktikantoj: por akiri la praktikadon de la lingvo. Ilustrita kurso, tekstoj, gramatikaj rimarkigoj, taskoj sendotaj por korektado.

La prezo de tiu kurso estas: 200 f.f.

Supera kurso: de- kaj al-tradukoj, atentigoj pri gravaj gramatikaj punktoj, ĉefaj eroj de la historio de Esperanto. Bona preparado al la Atesto pri KApableco.

Prezo de la kurso: 150 f.f.

GRAMATIKO PER BONHUMORO



KOMPARADO

Pli ol- malpli ol : li estas pli stulta ol malica — li ne vivos pli ol unu tagon- li iris pli kaj pli profunden — la fluo fariĝis malpli kaj malpli forta- tio ĉi estas malpli ol ni esperis.

Tiel, kiel : li estas tiel forta, kiel mi — elparolu tiel, kiel oni montris al vi.


Same kiel : via libro estas la sama, kiel la mia. ili rakontis la akcidenton same, kiel ni.

Tiom, kiom : vi faras por esperanto tiom, kiom vi volas.
li pagis tiom, kiom vi petis.

Tiam, kiam : mi skribos tiun leteron nur tiam, kiam vi estos ĉi tie.

Ju pli, des pli : ju pli oni posedas, despli oni avidas.

Troaj decibeloj :



Sufiĉas ! Tiam, kiam mi esperas dormi, vi funkciigas vian radio-aparaton kaj ĝiaj « rock and roll » - dancoj tremigas la teron, tiel, kiel tertremo kaj pleniĝas la ĉielon kvazaŭ kriaĉoj de demonoj.

Logika vidpunkto :



— Mi bedaŭras, Sinjoro, sed tiu letero estas tro peza ; ĉar vi devas pagi tiom, kiom estas postulate vi devas aldoni plian markon.

— Sed, nu, ĝi estos ankoraŭ pli peza !

Mistera psikologio :



— Mi estas furioza ! ĉu vi legis la kritikon de S-ro Gundo kontraŭ mia lasta libro ?

— Ne turmentu vin ; li nur ripetas tion, kion diras la aliuloj. Cetere, ju pli aĉe oni kritikas verkiston, des pli furora ĝi iĝas.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Belgio : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).

Britujo : John C. Rapley, 17 The Grange, Shepherdswell, Dover, Kent CT 15 7 Q B. (10 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).

Germanujo : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609) (25 D.M.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10°-D 03003 ALICANTE - (1 700 peset.).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (20.000 liroj).

Japanio : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugalio : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboa (2.800 esk.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfera frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34